

Leterujo, 4a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 583 1974.12.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La tri pasintajn semajnojn ni komencis babiladi kun niaj skribemaj geaŭdantoj. Alvenis poŝtaĵoj el 19 landoj : Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando. Hodiaŭ ni daŭrigas tiun babiladon.

A.- Sinjoro *Lennart Aberg* en *Gotenburgo*, Svedio, aŭskultis kun grandega intereso nian prelegserion pri la enketo inter 7 procentoj de la gejunularo de la kantono Neuchâtel. Kaj li skribas : « *Tre interesa serio, aktuala en la debato ĉie, ne malpli en Svedio. Mia edzino kaj mi ŝatus demandi, ĉu vi povus disponigi al ni kopion de la prelegoj de la serio, ekzemple, en formo de fotokopio. [...] Memkompreneble ni rekompencos vin pro viaj kostoj. [...] Cetere, ni estas tre feliĉaj sekvi viajn prelegojn. [...]* »

Cl.- Kun plezuro ni sendos la petitan fotokopiadon de tiu preleg-serio, kiu ĝis nun ne estis publikigita en esperanto-gazeto. Ni decidis doni tiun eblecon akiri niajn preleg-tekstojn al ĉiuj interesatoj. Ni agos tiel. Tra la kanalo de Kultura Centro Esperantista, kies sidejo estas en la urbo La Chaux-de-Fonds, ni indikos al la interesatoj la sendokostojn. Ni indikos, kiel antaŭpago tiujn kostojn. Tuj post ricevo de la koncerna monsumo, ni sendos la petitan dokumenton. Tamen ni konservos la aŭtorrajtojn. Tio signifas, ke ebla publikigo de la koncernaj tekstoj estos ebla nur kun nia konsento kaj kun eblaj korektaĵoj, kiujn tiam ni proponos.

A.- Ankaŭ la 8-jara *Tony Kokoravics* en *Bingley*, Britio, aŭskultis kun intereso nian prelegserion pri la junular-enketo.

Cl.- Koncerne la saman preleg-serion gesinjoroj *Najbaro* en *Keighley*, Britio, ne povis registri la tuton, kion ili multe bedaŭras. Se ili deziras profiti pri nia ĵusa propono, ili povas ricevi la mankantajn prelegtekstojn. Same estas por sinjoro *Sten Öfors* en *Johanneshov*, Svedio, kiu informiĝas pri skriba materialo pri tiu temo.

A.- Nia prelegaro pri mondanismo ankaŭ vekis multe da intereso, tiom da intereso, ke la organo *Sennaciulo* ĝin publikigis en la ĉisekvaj numeroj : aprilo, majo, julio, aŭgusto-septembro kaj oktobro 1974. Kiel aŭtoroj ni ricevis etan provizon de tiuj numeroj, kiujn ni dissendos al ĉiuj, kiuj esprimis sian intereson por tiu studo. Se vi deziras profiti pri tiu agado, vi skribu al ni tra la kanalo de Svisa Radio, Kurtonda fako, Bern, Svislando.

Cl.- En septembro ni raportis pri la unua migrado de esperantistoj en la svisa montaro. Al eblaj interesatoj ni povas anonci, ke en la dua semajno de aŭgusto 1975 disvolviĝos dua tia migrado, kiu permesos konatiĝi kun Berna Oberlando. Vi povas peti informilojn tra la kanalo de Svisa Radio.

A.- Ĉiam fosante en nia leterujo ni trovas la tristan anoncon de du mortoj. Temas pri tiuj de niaj aŭskultintoj *Achille Dumarquez* en Anzin-Saint-Aubin, Francio, kaj *Luigi Minnaja* en Romo, Italio. Ili estis 81 kaj 75 jar-aĝaj. Luigi Minnaja mortis, kiam li estis apenaŭ verkinta la ĉi-sekvan poeziaĵon, kiun ni legas al vi kiel memoraĵon lian.

Cl.- *Flugu foren, karto ! Flugu kolombe, flugu foren, karto :
transiru monton kaj transiru maron;
kaj portu vi tra ĉiu mondoparto
nian amikan sentan solidaron.*

*Portu la ĝojon kaj l'animan pacon
al suferanto kaj al afliktito,
transdonu pie la superan gracon,
la dolĉon kaj kvieton de l' spirito.*

*Al la homfratoj sur la vasta tero
bonvena estu la salut-omaĝo
kun bondeziro por la vivprospero,
celado fundamenta de l' mesaĝo.*

*Alportu, do, heroldo karitata,
la baton de amema koro frata.*

A.- Tiun poeziaĵon, kiun Luigi Minnaja skribis 2 tagojn antaŭ sia morto, ni konsideru kiel nian mesaĝon por la zamenhofa festo ĉijara.

Cl.- Koncerne nian legadon de eroj el la libro **Esperanto, danĝera lingvo** de Ulrich Lins, kiu raportas pri persekutoj kontraŭ la esperanto-movado, skribis sinjoroj Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, G. Farmes en Hull, Britio, kaj gesinjoroj Najbaro en Keighley, Britio. Sinjoro Patera skribis : « *La tuta historio pri persekutado de la esperanto-movado montras, ke esperantismo estas grava socia fenomeno kaj kiel tia ĝi subiĝas al similaj evolu-procedoj, kiel aliaj sociaj fenomenoj. Ekzemple kristanismo unue estis subpremata, la unuaj kritanoj ĵetataj al leonoj, sed poste ĝi estis akceptita kaj ĝi fariĝis eĉ grava potenco. Same pri multaj aliaj ismoj, ankaŭ pri marksismo-leninismo. Kaj mi tute ne dubas, ke la samo koncernas ankaŭ la esperantismon. Foje mi legis, ke ĉiu bona ideo devas unue elbatali por si lokon sub la suno, kaj ke tio, kio venkas sen batalo, esence ne estas bona. Do tiamaniere mi ĉiam konsolas min, ke malgraŭ ĉiuj maljustaĵoj kaj batoj nia lingvo fine tamen venkos.* »

A.- Dum la venonta jaro ni reparolos pri persekutoj kontraŭ esperanto, ĉiam laŭ Ulrich Lins. Ni ne forgesu, ke bedaŭrinde tiaj persekutoj daŭre okazas. Ni estis informitaj, ke en Ĉilio esperantistoj estis arestitaj de la diktatura registaro, nur ĉar ili estas esperanto-parolantoj, kaj la pasintan someron en la kadro de la SUK-kursoj en Lieĝo ni renkontiĝis kun portugalo, kiu estis enkarcerigita, nur ĉar li estas esperantisto.

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj radio-aŭskultantoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!